

Heinrich Heine,
 [Ne scias mi, kio okazis]
tradukita de Paul Gottfried Christaller

El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".

Ne scias mi, kio okazis
 al mia tristema kor':
 Antikva legendo min kaptis,
 ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
 murmuras kiel mister',
 la supron ŝtonegan orumas
 sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas
 mirinda sur la montet'
 kaj ŝia oraĵo radias,⁴
 ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon
 abundan per ora kombil',
 kantante misteran lidon,⁵
 ravantan kiel sunbril'.

Ŝipisto en sia ŝipeto
 kaptiĝas per stranga dolor',
 la rifon li tute ignoras.
 atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondoj englutas⁶
 ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
 kaj kulpa pri tio nur estas
 kantado de la virin'.

...

Heinrich Heine,
 Lurleia
tradukita de N. N. 01

Ignoro, quid id sibi velit,
 Tristissimus cur sim,
 Antiqui aevi fabellam
 Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,
 Et Rhenus leniter it,
 Cacumen montis lucescit,
 Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis
 Virgo pulcherrima,
 Auro nitet gemma frontis,
 Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pectit,
 Carmen canens procul,
 Mirandum id habet modum
 Nec non virilem simul.

In cymba navitam mille
 Angores feri tenent,
 Non videt scopulos ille,
 Ocli non si sursum vident.

Opinor undas devorare
 Nautam cum navicula,
 Effecit solo canendo
 Lurleia id dea.

...

⁴En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (*1860-08-21 – †1950-12-31).*

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto “H. Heine - Libro de Kantoj”, eldonita en 1911 de la “Esperanto-Propaganda Instituto” (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: “Buch der Lieder”, Abschnitt “Die Heimkehr”. - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller, kun foto de li.

*Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)